RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutierres González
08/09/2017 09:34:39

Kubo alvokas Usonon en UN ĉesigi la ekonomian sieĝon kontraŭ la insulo.

Havano, 7 sept (RHK) Ĉi-semajne kadre de la ĝenerala asembleo de UN Kubo alvokis Usono ĉesigi la ekonomian, komercan kaj financan sieĝon altrudatan al la kariba lando dum pli ol 50 jaroj, kiu multe damaĝas la insulon.

La kuba reprezentantino antaŭ UN, Anayansi Rodríguez, certigis ke ĉesigo de tia politiko konsistigus gravan paŝon en la konkretigo de tiu koncepto adoptita de la Ĝenerala Asembleo de antaŭ 18 jaroj.

Elimini la sieĝon estus klara mesaĝo favore al la paco kaj paca solvo de la diferencoj, ŝi aldonis, kaj esprimis sian bedaŭron ke la terglobo estas tre for de la konkretigo de packulturo.

Kubo insistas ke tiuj unuflankaj punoj de Usono kontraŭ Kubo estas la ĉefaj obstakloj al evoluigo de la kuba popolo, kaj ankaŭ postulis ĉesigon de premaj reguloj unuflankaj, programoj de reĝimŝanĝoj kaj enmiksiĝo en la internaj aferoj de suverenaj ŝtatoj, fenomenoj alfrontitaj de Kubo dum la lastaj kvin jardekoj.